

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 5 / 2013





Bedaŭrinde en tiu somero, du el niaj membroj forpasis.

- La 4an de Julio nia kara **Hélène FALK-BRACKE**, kiu estis naŭdekjara, diskrete forpasis en la maljunulejo kie ŝi restadis dum la lastaj monatoj de sia vivo. De kelkjaroj pro aĝo ŝi, post tre aktiva partopreno en la vivo de EBG (ŝi interalie iam estis vic-prezidantino kaj sekretariino de EBG), decidis retiriĝi de la klubo vivo, tamen ŝi restis membro kaj daŭre legis Aktuala-on, kiun ŝi dum multaj jaroj eldonis kaj en kiu ŝi multe skribis.

La klubanoj transdonas al ŝiaj familianoj kaj amikoj siajn plej elkorajn kondolencojn.

- Unu monaton poste, la 1an de Aŭgusto, tute neatendite, forpasis 53-jara alia klubano, **Claude COLLET**, kies patrino estas Dina DELOYER ankaŭ bone konata membro de EBG, kiun oni ofte renkontas ie kaj tie en la movado.

Ni prezentas al lia patrino, ĉiuj familianoj kaj amikoj niajn sincerajn kaj tutkorajn kondolencojn.

K O L O F O N O

38a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la
 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita
 kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : Angelos Tsirimokos prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigon sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

SEPTEMBRO

Merkredo la 11a 18:30 - 20:00 **Rekomenco de kursoj - kunvenoj**

Merkredo la 18a 18:30 - 20:00 **Prelego de Heidi GOES pri Orienta Timoro**

Sabato la 28a ekde la 18:30 **ESPERANTO-KAFEJO en BRUSELO** (Vidu paĝon 15an)
 Kafejo/restoracio «De Ultieme Hallucinatie»
 Rue Royale 316 Koningstraat - 1210 Bruselo

OKTOBRO

Sabato la 5a 14:00 - 16:00 **DILBEEK : Konvercia Rondo**
 Pli da informoj : Lydia Buyst 054.33.01.51

Merkredo la 23a 18:30 - 20:00 **EBGa Ĝenerala Asembleo 2013**
 Efektivaj membroj (kiuj, konforme al la Statuto, konsistigas la ĝeneralan
 membrokunvenon), estas insiste - kaj **estraranoj** tre insiste - petataj ĉeesti.

NOVEMBRO

Vendredo la 1a 14:00 / 18:00 **KKPS - en Werkhoven apud Utrecht (NL)**
ĝis dimanĉo la 3a posttagmeze <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com/hejmo>

Sabato la 9a 14:00 - 16:00 **DILBEEK : Konvercia Rondo**
 Pli da informoj : Lydia Buyst 054.33.01.51

Sabato la 16a 13:00 **Stella Plage (FR)**
ĝis Dimanĉo la 17a 17:00 <https://docs.google.com/file/d/0BxtgyObtxN8iX1FrV29zWWdTzKE/edit>




Saluton Kara Legantaro !

Verŝajne, por Esperantistaj libertempintoj, estis tre agrablaj parentezaj tempoj dum tiu varma renkontiĝa somero ... Laŭdire la multnombraj renkontiĝoj ege sukcesis ...

Nia FESTO ankaŭ ! Ĉiuj koncertoj bonegis kaj ĉefe, la etoso mirindis tagnokte ! Trinkejo, gufujoj, kinejo, dancejo, ekskursoj, ludoj, kant-, desegnaĵ-, danc-atelieroj, ...

Dank'al Stonĉjo, ni malkovris bonegan veganan manĝaĵon dum la tuta semajno, ... Ĉiuj partoprenantoj bone interkonitiĝis, amikiĝis, ktp ... Dankon al JEFO, Flo' kaj al ĉiuj helpantoj !



Se vi ne ĉeestis, bonvolu aŭskulti la lastajn elsendojn de «Varsovia Vento». Vi certe rekonos voĉojn kaj taksos la regantan aeron pozitive, ...

<http://www.podkasto.net/>

Nun ke ni bone amuziĝis, mi deziras al ĉiuj ... bonan ripozadon !

Samy

aktuala@esperantobruselo.org



Enhavo

Paĝo 2 :	Forpaso de la somero
Paĝo 3 :	Kolofono kaj agendo
Paĝo 4 :	Edito
Paĝo 5 - 6 :	Bicikla vojaĝo
Paĝo 7 :	Nova Civilizado
Paĝo 8 :	Ĝenerala Asembleo
Paĝo 9 :	KKPS / Ĉe-Seminario
Paĝo 10 :	Muzikkulturo (Nikolin)
Paĝo 11 :	Konkurso desegnaĵo
Paĝo 12 :	Diplo
Paĝo 13 :	Arkones
Paĝo 14 :	Voĉoj de la Tempo
Paĝo 15 :	Eo-Kafejo
Paĝo 16 - 18 :	Amikejo
Paĝo 19 - 20 :	Somera Tendumado



Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'


ITALIO

(6/4 -> 17/4/2009 - 846 km => 2717 km)

▷ Ni biciklas laŭ la maro dum 250 km por iri al Chiavari. En normala tempo temas pri banala distanco. Ne ĉi-foje. De la landlimo ĝis Imperia, pluraj bicikloŝoseoj anstataŭas eksan fervojan linion, kio evitas ke ni supren-malsupreniĝu en la montaro.

Sed antaŭ Savono la marborda vojo estas barita pro prilaboroj. Ni tamen provas pasi ĉar alikaze necesos longe kromiri sur malfacila tramontara itinero. Post 5 km sen renkonti aŭtojn, ni inverspasas biciklistojn. Ili indikas ke ja barita estas la vojo kaj tute ne eblas pasi, eĉ piede. Ni rezignas kaj revenas 5 km malantaŭen ĝis la devojigilo. Tuj supreniĝas la vojo, de la marnivelo ĝis 500 metroj alte en nur kelkaj malmultaj kilometroj. Dum la du-hora suprengrimpado ni daŭre vidas la saman vilaĝon malsupre, pli kaj pli etan. Ni iradas supren sed ne antaŭen. Fine prezentiĝas la malsuprendeklivo, ege kruta. Ni starigas nian tendon en diskreta loko apud vilaĝo, sed inter du aŭtoŝoseaj branĉoj kaj super fervoja linio. Ni tamen tre bone dormas ĉi-nokte.

En Norda italo troveblas pesiloj en ĉiu vilaĝo kaj, pli grave por ni, ankaŭ fontanoj. En Ĝenovo, ĵurnalisto hazarde renkontas nin. Ni komunikas per miksaĵo de la itala, hispana, angla kaj franca. Li demandas, ĉu ni laboras por la entrepreno Esperanto, kiun li legis de sur niaj biciklaj ĉemizoj! Ni rapide klarigas, ke temas pri neŭtrala lingvo, kiu estas posedaĵo de neniu lando. Li ankaŭ demandas, kial ni decidis trapasi Ĝenovon... ĉar temas pri la plej rekta vojo al Aŭstralio... respondas Cirilo.



▷ Poste, eksonoras la Roza poŝtelefono dum ni biciklas sur trafikplena vojo. Ĉar ni instrukciis, ke oni telefonu nur okaze de urĝa afero, ni haltas kiel eblas malplej malbone por respondi. Temas pri voko de Cirila familiano por banalaĵo. Ni ne komprenas, simpla skribmesaĝo sufiĉus... Nur kiam ni alvenas en Chiavari, kie gastigas nin la esperantistino Anna, ni eksciias pri la terura tertremo okazinta en Italio antaŭ kelkaj tagoj. Estas multaj mortoj...



Ni ripozas unu tagon en Chiavari, origina urbo de la gepatroj de Garibaldi, granda itala generalo kaj politikulo en la 19a jarcento. Ni sekve estas gastigataj de Angella, alia esperantistino en Parmo. En Mantovo ni renkontas Eric kaj Lili kiuj bicikle vojaĝas kiel ni. La morgaŭo estas Paska lundo kaj ni estas afable invitataj de anoj de priklimatizila entrepreno kune piknikantaj.



Ili vidis nin serĉi por picejo dum restis al ni nenio plu por manĝi kaj ĉiuj vendejoj estis fermitaj.

Por danki ilin ni aperigas ilian entreprenan retadreson en nia paĝo pri ligoj kaj sponsoroj (<http://www.horizonto.net/ligoj/ligoj.html>).




La morgaŭon la balkono de Ĝulieto faros nin fuĝi de Verono. Estas tiom da turistoj ke iu ajn Romeo rezignus. En Padovo gastigas nin Robbi, ano de la itala gastigreto Ospitabici. Li bicikle vizitigas sian urbon al ni.

Finfine, jen la tiom atendita Venecio, kie ni neniam sukcesos atingi nian hotelon, ĉar ĝi troviĝas en kvartalo atingebla nur per ŝipbuso... sen bicikloj. La hotelestraro tamen telefone asertis, ke eblas enŝipigi biciklojn.

En Trieste, iu lokulo gvidas nin per mopedo ĝis bicikloŝoseo direktiĝanta al Slovenio.

Temas plian fojon pri eksa fervoja linio. Ĝi ne estas tegita kaj ne facilas antaŭeniri, des pli ke ĝi senĉese plialtiĝas. Ĝi tamen ebligas malrenkonti motorajn veturilojn. Ni tiel alilandiĝas en la vespero, nur vidante ŝildo dirante "confine di stato", ŝtata forangulo.



(sekventa)

Manifesto por nova civilizado - « *Sufiças trairi la ponton* »

La libreto "Manifesto por nova civilizado" kun subtitolo "*Sufiças trairi la ponton*" celas plenigi kompletan mankon de alternativo rilata al etiko kaj daŭro de nia civilizado. La du kunverkintoj havas klaran pozicion pri gravaj problemoj (socio, ekologio, komunikado, financo, heredaĵo) kaj diras sian indignon pri forgeso pri la homo en ĉiuj kampoj kaj pri la laŭdira progreso, kiu fakte kaŝas la volojn regi kaj alproprigi. Neniu inda ŝanĝo estiĝos sen profunda ŝanĝo en la spiritoj, kaj tiu libreto alportas la necesajn elementojn. Kerna ĉerpoŝto estas la verko de profesoro Gilbert Durand "Scienco de la Homo kaj Tradicio".

Antaŭparolo de la tradukinto :



Michel Eliard, (Ndlr, emeritulo de la Publika Administracio aliĝis al diversaj asocioj kiel : Mountains wilderness, Sortie du Nucléaire,

Europe Démocratie Espéranto, ktp ...). Li estas esperantisto el suda Francio kaj... li ne havas televidilon, sekve restas al li multe da tempo por legi kaj pripensi.



Kun juna instruisto, **Patrick Pappola** forte engaĝita en bataloj por protekti naturon (defendo de la urso en la montaroj Pireneoj,

natura rezervejo mara kaj tera inter Marseille kaj La Ciotat . Li multe diskutis pri kia mondo restos por niaj infanoj se ni daŭre vivas tiamaniere. Tute klare estas, ke nia mondo ne povas daŭre vivi laŭ la konsumsistemo, kiu permesas vivigi 6 miliardojn da homoj laŭ la usona

vivmaniero dum ni jam estas 7 miliardoj. Same tute klare estas, ke ni, el ekstremokcidenta mondo, kiuj ĝuas la diversajn profitojn de progreso ne rajtas malpermesi al la evoluantaj landoj celi la samon, do ni kune, ni la Homoj, devas krei novan socimodelon ne kun kresko sed kun malkresko por respekti la planedon kaj la homojn. Sed ne nur konkretaj havaĵoj permesas al la homo bone vivi se li ne samtempe pripensas sian lokon en la mondo : kiel rilati kun la naturo ? kiel rilati kun la Tradicio ? kiel konscii, ke ni vivas nur surbaze de diversaj mitoj, neniel raciaj. Apogante siajn ideojn sur la ideoj de nunaj sociologoj (ĉefe Gilbert Durand) aŭ malnovaj filozofoj, la du kunverkintoj invitas nin pripensi kaj kun ili trairi la ponton al alitipa socimodelo. Trairi, ne nur transiri ĉar ne mankos problemoj kaj malfacilaĵoj. Tiu "promenado" tra la jarcentoj kondukos nin de greka mitologio al francaj filozofoj, de la pensantoj de la 18a jarcento (jarcento de la Lumoj) al nuntempaj bardoj. Por helpi vin, vortareto je la fino de la eseo iĝas kvazaŭa panoramo de moderna filozofio.

Renée Triolle



Vinko Markovo prezentis la broŝuron **Manifesto por nova civilizado** kadre de la 86a **SAT-Kongreso** okazinta en Madrido lastan someron (Ndlr : por spekti filmeton pri tio, bv tajpi ĉe youtube «manifesto por nova civilizado»).

Soci-filozofia eseo (eldonita en Julio 2013)Aŭtoroj : Michel Eliard, Patrick Pappola Traduko (elfrancigo) : Renée Triolle 55 paĝoj ; Formato : 20x14 cm ; Prezo 3 € ISBN : 978-2-918053-10-1



Ĝenerala Asembleo de EBG 2013 de la 23an de Oktobro 2013

kiu okazos en nia klubejo : Van Maerlant-strato 2, en 1000 Bruselo

Tagordo

1. Bonvenigo, konstato de kvorumo (2/3 de la efektivaj membroj)
2. Aprobo de pasintjara protokolo (vidu la sekvantan paĝon).
3. Raporto pri la pasintjara agado kaj nuna stato de la Grupo:
 - o financa, fare de la kasisto.
 - o morala, fare de la prezidanto.
4. Aprobo de la kontoj kaj malŝarĝo de la nuna estraro.
5. Sinprezento de la kandidatoj por la estraraj postenoj.
 - o Notu ke Angelos TSIRIMOKOS intencas ne rekandidatiĝi kiel prezidanto
6. Elekto de nova estraro.
7. Planoj kaj proponoj por lernojaro jam komenciĝinta kaj Zamenhof-festo 2014
8. Krom la necesaj modifoj pri ŝanĝoj en la estraro, ĉu la statutoj de la asocio estas ankoraŭ ĝisdataj ? Viaj ideoj pri tio ?
9. Pro la fakto, ke la aliro en la konstruaĵo pli kaj pli malfaciliĝas kaj ke la nombro de Komisionuloj en nia asocio malpliĝas; ĉu ne estas tempo pripensi novan solvon ? Ĉu trovi ĉambron kie nia biblioteko povos esti pli efika, kie la organizo de prelegoj ne nepre devas okazi samtempe kiel la kursoj ? Kaj kie ni povus organizi aferojn kiam ajn ? Kie ? Ĉu lupreni ĉambron? Ĉu finance eblas ? Ĉu en kutura centro, lernejo ? Ĉu vi havas ideojn ?
10. **Ni nepre bezonas** iu(j) respondeculo(j) por la organizo de kunvenaj agadoj (prelegoj, ktp ...). Kiu(j) ?
11. Taksado de la nova sistemo de AKTUALA (aŭ rete, aŭ papere, aŭ ambaŭ)
12. Malĝojiga forpaso de EBGanoj de la ĵus pasinta somero
13. Diversaĵoj

Efektivaj membroj (kiuj, konforme al la Statuto, konsistigas la ĝeneralan membrokunvenon), **estas insiste - kaj estraranoj tre insiste - petataj ĉeesti**. Se tamen vi tute ne povas partopreni la ĜA-on, ne forgesu doni skriban prokuron al iu alia efektiva membro por vin reprezenti. Membro rajtas reprezenti **nur unu alian membron** (Art. 10 de la statuto).

Kompreneble, ĉiuj kotizpagintaj membroj estas bonvenaj kaj havas parolrajton, kvankam sen voĉdonrajto.

Angelos Tsirimokos, Prezidanto



KKPS

Klaĉ-Kunveno Post-Somera

*de la 1a ĝis la 3a de novembro 2013
en Werkhoven (apud Utrecht)*

Venu, Partoprenu, Ĝuu !

Informoj kaj aliĝilo : <http://kkps-klacxkunveno.wikispaces.com>



ĈE-SEMINARIO EN HAGO (DEN HAAG) - Nederlando

Andreo Cseh (1895 - 1979) estis rumana Esperantisto, kiu famiĝis ĉar li sukcese instruis Esperanton al grupo da plurnaciaj laboristoj kiuj ne havis komunan lingvon, per meminventita rekta metodo. Poste «Cxe»-instruado famiĝis tra tuta Europo precipe en la unua duono de la antaŭa jarcento: por E-kursoj, oni elektis eksterlandan instruiston, kiu prefere ne konas la lingvon de la kursanoj kaj do principe ne uzas etnan lingvon. Tiaj kursoj ankoraŭ nun montriĝas sukcesaj.

La estraro de **Internacia Esperanto-Instituto** (IEI) decidis denove organizi Ĉe-Seminaron. Tio estas kurso destinita por personoj, kiuj volas mem instrui laŭ la Ĉe-metodo au nur konatiĝi kun ĝi. La partoprenantoj devas bone regi Esperanton, ĉar la seminario ne taŭgas por lingvo-komencantoj. Ankaŭ esperantistoj ekster Nederlando estas bonvenaj. Jam anoncis sin samideanoj el Germanio kaj Polio.

La instruistino estos **Katalin Kovats**, tre sperta Ĉe-instruistino, kiu dum pluraj jaroj gvidis en diversaj landoj Ĉe-kursojn.

La seminario okazos en **Riouwstraat 172, la oficejo de IEI**, dum 3 tagoj: je **la 14-a, 15-a kaj 16-a de marto 2014**.

Lecionoj estos matene dum 2 horoj kaj posttagmeze dum 2 horoj. La lernantoj povos dum 3 tagoj komune lunĉi en itala restoracio. Ĉiu devas mem prizorgi sian eventualan tranoktadon.

Aliĝkosto nur por la kurso estas **35 €**, pagendaj al IEI konto ĉe UEA: «iein-q» kun mencio «seminario» aŭ al nia konto 162626 Internationaal Esperanto-Instituto, Den Haag.

Pliajn informojn donos la organizanto Ed Borsboom: tel 030-2202673 aŭ ed.borsboom@versatel.nl.



Fama Esperanto-muziko ...

Hieraŭ la monata literatura kafejo de Fajszki Amika Rondo kaj Esperanta PEN enfokusiĝis pri nia originala muzika kulturo. Anjo Amika prezentis specimenojn de kanzonoj kies teksto estis verkita kaj melodio komponita por esperanta kantistino, originale en nia lingvo.

Temis pri la 33-turna disko en kiu Nikolin' kantas tri komponaĵojn de Gerardo Tarallo, laŭ la versoj de Giorgio Silfer (1989): "La bona formiko", "Serena lulkanto" kaj "La Esperanto-knabino". Laŭ la aŭtoroj, la tekstoj prezentas kulturon pure esperantan, pro diversaj kialoj.



Nikolin dum FESTO 2013

En "**La bona formiko**" la poeto donas alternativan version de la fama fablo de Lafonten'. Ankaŭ la cikado plenumas socie utilan funkcion: per sia kanto ĝi agrabligas la penon de la formiko somere, kaj ankaŭ ĝojigas la longan, tedan vintron de ambaŭ.


"**Serena lulkanto**" (Serena estis la filineto de Tarallo) donis al Silfer la okazon konstrui lulkanton ĉirkaŭ onomatopeo pure esperanta: ne plu la plej uzata, sed ruse pruntita "baju baju" de la "Siberia lulkanto" de Julio Baghy.

"**La Esperanto-knabino**" celis esti iel reklama kanto: tial ĝi ekzistas ankaŭ en franca varianto (ĉiam originale verkita de Giorgio Silfer). Ĉu la profilo skizita de la aŭtoro pri la esperanto-knabino (kiu fidelas sian lingvon pli ol la ceterajn amojn...) estas la plej oportuna por Esperantio, tion decidu la publiko.

En 2001 "La bona formiko" estis selektita por speciala KD eldonita de la valona registaro en Belgio (NdlR: «*Eveil aux Langues*»), kun porinfanaj kantoj en dek du aliaj lingvoj. La esperanta, kantita de Nikolin', rezultis **la plej ŝatata**, laŭ referendumo ĉe la lernejoj.

La literatura kafejo okazis, kiel kutime, ĉe la Landa Fremdlingva Biblioteko en Budapeŝto, kun la teknika helpo de f-ino Anikó Nemes, esperanto-referanto. (...)

<http://www.esperantio.net/index.php?id=2194>
 Artikolo el Esperanta Civito (2006) eldonita sub titolo:
 «**Budapeŝta literatura kafejo pri muzika kulturo**»



Konkurso pri desegnado kaj pentrado "Arboj de la mondo"

La konkursa temo estas:

"Arboj de la mondo. Arboj de Vilaĝo Karlo Paco"

Aŭgusto-Septembro 2013

Argentina Esperanto Ligo invitas ĉiujn infanojn kaj gejunulojn (Esperantistoj kaj gefiloj de Esperantistoj), partopreni **konkurson pri desegnado kaj pentrado, okaze de la 55a Argentina Kongreso de Esperanto** realigota en la parko-bieno "La Quinta" en Vilaĝo Karlo Paco - Provinco de Kordobo - Argentino, de la 12-a ĝis la 14-a de Oktobro 2013.

La interesitoj povas partopreni per desegnaĵo aŭ pentraĵo laŭ iu ajn tekniko, ne tridimensia, en mezuro 227 por 316 mm, en unu el la sekvaj kategorioj:

a) 4 ĝis 9-jaruloj; b) 10 ĝis 14-jaruloj; c) 15 ĝis 18-jaruloj

Dorse de la verko devas esti klare notitaj la sekvaj informoj: kompleta nomo de la aŭtoro, adreso, ret-adreso, naskiĝdato, titolo kaj tekniko.

La konkursaĵojn oni sendu volvitaj, ne falditaj, al la sekva adreso:

Argentina Esperanto Ligo
At. Jorge Enrique Cabrera
Camacua 105 Piso 5 B
(CP 1406) CABA
República Argentina



Ili estos akceptataj ĝis la 5-a de Oktobro 2013.

Estos aljuĝitaj po unu premio al ĉiu el la tri kategorioj a, b kaj c; tiu premio konsistos el argentina artaĵo. Cetere, estos aljuĝitaj du premioj "Honora mencio" en ĉiu kategorio. Ĉiu konkursaĵo ricevita fariĝos parto de la kolekto de AEL.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al AEL, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj papere, interrete kaj per aliaj medioj.

Pliaj informoj pri la Kongreso kaj ĝia programo ĉe <http://www.esperanto.org.ar>

aŭ <http://argentinaesperantoligo.blogspot.com.ar/2013/08/ael-konkurso-pri-desegnado-kaj-pentrado.html>



Ili ĵuris, ke ili ne aspiras la egiptan prezidantecon. Post rompi tiun unuan ĵuron, la Islamaj Fratoj devis alporti „panon, liberon, socian justecon”. Sub ilia regado la malsekureco kreskis, la mizero ankaŭ. La amaso tiam rekonkeris la stratojn por postuli la foriron de la prezidanto Mohamed Morsi (vd la artikolon de Alain Gresh ĉe <http://eo.mondediplo.com>). Luj revolucioj komenciĝas tiel. Kiam ili triumfas, oni celebras ilin dum jarcentoj sen tro zorgi pri ilia relativa sponteco aŭ pri la juraj bazoj de ilia estiĝo. La historio ne estas seminaro pri juro.

Post la diktatoreco de s-ro Hosni Mubarak, estis iluzia imagi, ke la longa sufokado de la politika vivo, la kontraŭeca debato ne influus la unuajn elektojn. En tiaj kazoj la elektantoj ofte konfirmas la influon de la plej bone strukturitaj sociaj aŭ instituciaj fortoj (la grandaj familioj, la armeo, la antaŭa unusola partio) aŭ tiun de la organizitaj grupoj, kiuj plektis iliajn eksterleĝajn retojn por eviti la subpremadojn (la Islamaj Fratoj). La lernado de demokratio daŭras multe pli ol la tempo de elekto. [1]

Promesoj ne plenumitaj, gvidantoj elektitaj kun malgranda plimulto kaj kiuj tuj alfrontas malaprobajn aŭ koleron de la publika opinio, gigantajn manifestaciojn organizitajn de tre miksitaj koalicioj: en la lastaj jaroj ankaŭ aliaj landoj ol Egiptio spertis tiajn situaciojn, tamen sen ke la armeo alprenis la potencon nek senjuĝe malliberigis la ŝtatestron, nek murdas liajn aktivulojn. Alie oni nomas tion puĉo aŭ ŝtatrenverso.



Tiun terminon la okcidentaj landoj ne uzas ĉi tie. Kiel elegantaj diplomataj arbitraciantoj, ili ŝajnas pensi ke certaj puĉoj – en Malio, en Honduro, en Egiptio ... – estas malpli neallaseblaj ol aliaj. Unue, Usono apogis la Islamajn Fratojn, poste ĝi daŭrigis sian militan helpon al Kairo, kiam la prezidanto Morsi estis „deoficigita” de la armeo. Konservativa alianco inter tiu kaj la Fratoj estintus la ideala scenaro de Vaŝingtono; ĝi estas for.

Pri tio ĝojas samtempe la nostalguloj pri la malnova reĝimo, naserismaj naciistoj, la egiptaj novliberaluloj, salafistoj, la laika maldekstro, la saud-arabiaj monarĥoj. Inter ili estas nepre elreviĝantoj ...

Kvankam Egiptio estas bankrota, la alfrontiĝo inter la armeo kaj la islamistoj apenaŭ koncernas la decidojn pri ekonomia kaj socia politikoj, larĝe senŝanĝaj post la falo de s-ro Mubarak. Tamen, se ĝi kondukas al elektoj aŭ al ŝtatrenverso, kion valoras revolucio, se ĝi ŝanĝas nenion pri ĝuste tiuj temoj?

La novaj gvidantoj subordigas la bonfarton de sia lando al la financaj helpoj (12 miliardoj da dolaroj) de la Golf-ŝtatoj, speciale de la tre reakcia Saud-Arabio. [2] Se tiu opcio konfirmiĝas, tiam la juristoj vane eldiras ion kaj alion - la egipta popolo reiros la vojon de la strato.

Serge HALIMI. Tradukita de Vilhelmo Lutermano el la franca.

[1] Vd Alexis de Tocqueville, „Chacun à son rang»” [„Ĉiu laŭ sia rango»”], *Le Monde diplomatique*, aprilo 1998.

[2] Vd „Saud-araba senpuneco”, *Le Monde diplomatique*, marto 2012.

ARKONES

ARtaj KONfrontoj en ESperanto 20 - 22 IX 2013



ARKONES

(ARtaj KONfrontoj en ESperanto) estas sendependa **kultura kaj arta esperantista aranĝo** en Poznań, Pollando. Ĝi estas certe unika kaj unu el la plej grandskalaj manifestacioj de Esperanto-kulturo. **La programo certe boninfluos vin.**
Por junularo :-)

Arkones aparte bonvenigas junularon. Pro tio oni antaŭvidis favorajn rabatitajn prezojn por junuloj < 25j. kaj por membroj de Pola Esperanto-Junularo (ili partoprenas senpage!).

Aparte avantaĝo estas malmultekostaj flugoj al/el Poznań. Kun fluglinioj WizzAir kaj RyanAir oni povas akiri biletojn jam (ofte) ekde kelkaj Eŭroj.

Kiamaniere aliĝi al ARKONES '13 ?

Oni povas aliĝi rapide kaj facile per la reta aliĝilo (<http://arkones.org/partopreno/aligilo>).

Nepre informiĝu pri partoprenkondiĉoj kaj pri kotizoj.

Atentu! Personoj, kiuj ne aliĝos per la reta aliĝilo devos aliĝi surloke kun krompago de 5 €. Membroj de PEJ, kiuj aliĝos ĝis la 15-a de septembro rajtas loĝi en amasloĝejo senpage!

Kiamaniere kontribui al la programo?

En la reta aliĝilo bv. sciigi, ke vi volas kontribui. Vi ankaŭ indiku, ke vi aliĝas kun rabato por kontribuantoj. Ni certe kontaktos vin!

Trovu nin ĉe  **facebook** : ARKONES.org

Arkones en  : <http://www.podkasto.net/arkivejo/arkones-artaj-konfrontoj-en-esperanto/>



«*Voĉoj de la Tempo*» de Eduardo GALEANO

Leciono pri medicino

En leciono pri intensa terapio, en Bonaero, Rubén Omar Sosa esploris la kazon de Maksimiliana, la plej grava leciono de ĉiuj liaj studjaroj.

Profesoro priskribis la situacion : s-ino Maksimiliana, elĉerpita post tuta vivo pasigita sen dimanĉoj, antaŭ kelka tempo venis en malsanulejon, kaj ĉiutage ŝi petis la samon :

- Bonvolu, doktoro, ĉu vi povus kontroli mian pulson ?

Post iometa premo sur ĉia manartiko la kuracisto diris :

- Ĝi estas tre bona. Sepdek ok. Perfekta.

- Ho, dankon, doktoro. Kaj nun, ĉu vi povus kontroli mian pulson, bonvolu ?

Kaj la kuracisto kontrolis ŝian pulson kroman fojon kaj klarigis al ŝi denove, ke ĉio estas en bona ordo kaj ke tio ne povas esti pli bona.

La sceno ripetiĝis ĉiutage. Ĉiufoje kiam li pasis ĉe la ĉambro de s-ino Maksimiliana, tiu raŭka voĉeto vokis lin kaj streĉis al li sian brakon, kvazaŭ branĉeton, re kaj ree.

Li obeis, ĉar bona kuracisto devas esti pacienca kun siaj pacientoj, sed li diris al si : *Tiu maljunulino estas iom teda*, kaj li pensis : *Ŝi bezonas bolton*.

Nur jarojn poste li komprenis, ke ŝi petis nur ke iu ŝin tuŝu.



Esperanto-Kafejo

la 28an de Septembro



Bibilado, klaĉo (nevere 😊) - manĝo, kantado, renkontiĝo, bonhumoro, ...

... atendas vin ekde la 18a30 ĝis ... iam nokte !

De Ultieme Hallucinatie

Rue Royale 316 Koningsstraat

1210 Bruselo

02 / 217. 06. 14

- Premetro-stacio : Botanique - Kruidtuin
- Tramoj : 92-93 Haltejo : Ste-Marie-St Maria
- Je 600m de la Norda-stacidomo



De Ultieme Hallucinatie

Amikejo: la Esperanto-lando kiu preskaŭ ekzistis

► (Unu el la junaj viroj kiujn la Belga armeo vokis al la bataalkampo, dum lia bofrato devis servi en la Germana flanko, estis la muzikisto Willy Huppermann.)



Estante ĉe la fronto li komponis pacmarŝon kiun li nomis “Amikayo” memore al sia perdita patrio. Multajn jarojn poste iu Dany Huppermans – supozeble parenco de Willy – faris odon al Kelmis en la loka dialekto.



Kiel sciante, Germanio perdis la militon, kaj en 1919 la Versajla traktato provizore asignis Neŭtralan Moresneton al Belgio, kune kun la Germanaj municipoj Eupen, Skt. Vith kaj Malmédy.

En 1920 oni okazigis plebisciton, sed pro fortega Franca premo la voĉdono estis nek libera, nek egala, nek sekreta, tiel ke al Belgio la novaj regionoj estis kvazaŭ truditaj. Nur ses jarojn poste Belgio sekrete provis revendi ilin al Germanio, sed la Franca registaro eksciis kaj malebligis tion.

Ĉiuokaze jam estis malmoderniĝanta tiu formo de nereakta sklavkomerco en kiu ŝtatoj vendis homojn kun tero, tiel kiel

ekzemple okazis al la Danaj insuloj en Karibio en 1917.

Dekomence Belgio estis oficiale Francilingva, tamen kun bazlerneja instruado en la Nederlanda lingvo tie kie ĝi estis la gepatra lingvo de la infanoj. Tion oni rigardis kiel lingvan liberecon, ĉar la burĝaro atendis ke ĉiu ajn ricevinte la ŝancon nature preferos anstataŭigi sian Flandran *patois* favore al la norma Franca. Kun la tempo la Flandroj tamen ĉiam pli konsciiĝis pri siaj egalvaloro kaj lingvaj rajtoj, kaj la Nederlanda malrapide, sed persiste plivastigadis sian uz-teritorion. Dum la 1-a mondmilito oni provis fari la Nederlandan instrua lingvo en la universitato de Gento, kaj en 1930 oni sukcesis. Samjare estis fondita Flandra Ligo Esperantista, kaj de tiam la Esperanta iniciato en Belgio ĉefe situas en la Flandra flanko.

Dum ambaŭ mondmilitoj la Germanoj certagrade sukcesis ludi per la antagonismo inter Flandroj kaj Valonoj, kaj en la maltrankvilaj tridekaj jaroj, iuj Flandroj komencis agiti por memstara Flandrio. Aliflanke la plej multaj germanlingvaj Belgoj repaciĝis kun la Belgianeco, precipe kiam ekregis Hitlero, kaj post la 2-a mondmilito Okcidenta Germanio ne deziris riski ion pri la limoj al la NATO-partneroj. Por mallongigi longan rakonton, nuntempe estas difinita Germanlingva Komunumo de Belgio samrange kun la Franc- kaj Nederlandlingva. La municipa retpaĝo kelmis.be do tute nature estas en la Germana, kvankam la municipo estas parto de la Francilingva provinco Liège (France *Liège*, Nederlande *Luik*, Germane *Lüttich*). La Germanlingvuloj konsistigas 0,73 % de la loĝantaro de Belgio.

Forgesiĝo kaj remalkovro

Post la 1-a mondmilito estis kvazaŭ ĉiuj preferis forgesi la historion de Neŭtrala Moresneto. La teritorio ja estis tre malgranda, do eble estas ne tiom strange ke estas malfacile trovi fontojn el tiu tempo ekster Belgio. Sed ankaŭ ne estas eĉ unu vorto pri la afero en la du grandaj konsultverkoj pri Esperanto, nome Enciklopedio de Esperanto de 1935 kaj Esperanto en Perspektivo de 1973, kvankam Esperanto plu “ŝvebis en la aero” en Kelmis. Tial oni renkontas nemalmulte da miskomprenoj kaj malprecizaĵoj esplorante la temon perrete. La plej harhirtiga aserto kiun mi renkontis, estas ke Neŭtrala Moresneto neniam ekzistis – krom kiel konscia eraro de kartografo, por protekti sian kopirajton!



Sed en 1991 io okazas. Tiujare la Nederlanda televido “Nederlandse Omroep Stichting” dissendas longetan dokumentfilmon titolitan “La forgesita lando Moresneto”. En Februaro 2010 iu alŝutis ĝin al Youtube en kvin partoj, rigardeblaj ĉi tie: unua parto, dua, tria, kvara, kvina. La anoncado estas en la Nederlanda, la intervjuoj plejparte en la Germana, sed ankaŭ en la Franca kaj Esperanto. Ĝi estus “la definitiva dokumentfilmo” pri la temo, sed la 13-an de Septembro 1998 la Nederlandano Cees Damen starigas la retpaĝon www.moresnet.nl, kaj kelkajn jarojn poste la intereso kvazaŭ eksplodas.

En septembro 2003 la germana regiona radio Südwestrundfunk dissendas tem-programon en kiu Alfred Bertha kaj aliaj Kelmis-anoj rakontas pri la historio de Amikejo. En decembro 2004 plutraktas ĝin la tut-germania Deutschlandradio, kiu uzas la historiiston Herbert Ruland por meti la rakonton de Bertha en pli grandan perspektivon. En decembro 2006 artikolo en la gazeto Die Zeit elfosas novajn aspektojn, kaj en septembro 2007 la nuna loka UEA-delegito, Mathieu Schrymecker, rajtas rekomendi Kelmis-on en la vojaĝkonsila serio “km42” de Spiegel-tv. En majo 2008 Deutschlandradio denove okupiĝas pri la temo per treege ĝisfunda temprogramo, en kiu Herbert Mayer kaj Detlev Blanke estis petitaj detaligi la Esperanto-aspekton.

La disvastigo de la interreto kredeble estas grava elemento de ĉi tiu evoluo. Moresneto estas tipa ekzemplo de temo kiun ordinara enciklopedio preterlasus, sed pri kiu oni evidente farus artikolon por Vikipedio. La Nederlandano Peter Bouhuijs faris belan 12-minutan Google-filmeton kun subtekstoj en Esperanto kaj... iu kompreneble starigis Facebook-grupon nomitan “We want the return of the ministate of Moresnet !!!”. Tio siavice donas okazon al la “malmolaj” komunikiloj denove okupiĝi pri la temo. Arika Okrent traktas la Moresnet-historion en sia nova libro, kaj Marde la 6-an de Aprilo 2010 la Flandra televida stacio *Canvas* dissendis programon pri Neŭtrala Moresneto (surrete ankoraŭ videblas nur anoncfilmeto kaj kelkaj fragmentoj).

Siatempe Neŭtrala Moresneto estis ofte komparata kun Ĉikago pro la anarkio kiu regis en ĝi, sed konsidere al la pacemo de la lokanoj kaj ilia malstresa vivmaniero supozeble estas pli trafe kompari ĝin kun la libera urbo Christiania. En la Nederlanda milde satira blogo La Ministerio pri Deciditaj Aferoj ankaŭ estas propono

starigi Novan Neŭtralan Moresneton kiel modelprojekton, interalie por leĝigo de kanabo. Sed tio supozeble fiaskus pro tio ke la jura statuso de Neŭtrala Moresneto estis eĉ pli fragila ol tiu de Christiania hodiaŭ.

Esperanto en la publika spaco

Hodiaŭaj Esperantistoj konscias ke necesas labori kun konsiderinde pli longa temposkalo ol duona jaro, se oniaj klopodoj havu sencon. Okazigo de UK aŭ alia granda Esperantorenkontiĝo povas influi la aspekton de urbo nur tiom longe kiom ĝi daŭras, sed kelkloke Esperanto ekakiras konstantan lokon en la publika spaco. Tio estas evidenta en la pola urbo Bjalistoko, kie L.L. Zamenhof naskiĝis en 1859, sed same atentinda estas Herzberg am Harz, urbo kun 14.000 loĝantoj kiu situas ĝuste meze de Germanio, 90 km sude de Hanovro.



Ŝildo en Herzberg am Harz

Unu el la unuaj dulingvaj ŝildoj en Herzberg

La 11-an de Julio 2006 la municipa konsilio de Herzberg unuanime decidis aldoni al la urbномо la oficialan epiteton “la Esperanto-urbo”.

Tiu rezulto povis okazi ĉar la urba staciestro Joachim Gießner (1913-2003) estis tre aktiva estrarano de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio kaj ties Germana sekcio. Kelkaj Eŭropaj fervojaj kompanioj antaŭe havis Esperantlingvajn signoklarigojn en siaj horaroj, sed tio estas

malpli grava nuntempe, kiam oni ĉiam pli konsultas horarojn surrete. En Herzberg troviĝas interalie Esperanta edukcentro, nombro da ŝildoj dulingve Germane-Esperantaj, Esperantoinstruado en la elementa lernejo kaj vasta esperantobazita kunlaboro kun la pola ĝemelurbo Góra. Sed tio estas rakonto por alia fojo.


Leviĝo kaj stagno

Tamen, ĉu ĉio ĉi estas serioze konsiderebla aŭ ne? La plej proksima Belga Esperantoklubo en Verviers opiniis ke ne. En letero de la 21-a de Junio 1908 al la revuo La Belga Sonorilo ĝi avertas ke la projekto nehelpeble ridindigos Esperanton se ĝi fiaskos, kio plej certe okazos. Tio igis Karl Schriewer, Kelmis-an Esperantiston nur 19-jaran, promesi al Gustave Roy instrui al la loĝantaro Esperanton kvar fojojn en semajno, dufoje al infanoj, dufoje al plenkreskuloj. Dekomence anoncis sin 139 lernontoj. Per Schriewer la projekto ekhavis tirĉevalon, kaj per financa apogo de Moll kaj aliaj patronoj, la moralo de la Esperantoasocio restis alta.

La artikolo unue aperis en la blogo de Jens S. Larsen

http://www.ipernity.com/blog/jens_s_larsen/242584

libera folio
SENDEPENDA MOVADA BULTENO



Somera

La somera tendumado de la verdaj skoltoj okazis lastan semajnon de aŭgusto, en Rosée, Valonio. Jen eta fota raporto pri la semajno !

kun Valer, Alina, Pjotr, Samy, Simon kaj Thomas

Konstruado de la flago !

Tiu flago montras arbon kun folioj kaj fruktoj. La radikoj estas verda stelo. Sube, estas skribita la slogano de la verdaj skoltoj : «Ni Kreskas»



Konstruado de la flosa !

En Rosée estas tiom bela lago ke oni ne devis maltrafi la okazon konstrui floson. Estis parto de la amuzaĵo ĉar kelkaj senkonsciuloj falis en la lago.

Granda marŝado

Dum 5 horoj kun paŭzoj, ni marŝis de Rosée ĝis Dinant, sen skoltestro, kaj tranoktis en iu bieno tie.





Alproksimiĝas la fino de la marŝado...

Ne, tiuj homoj ne estas ebriaj, nur iomete lacaj.

Sed tio ne malkuraĝigis tri frenezulojn daŭrigante per «postmarŝado». Simon, Pjotr kaj mi (Samy) iris nokte al la centro de Dinant (dekstra foto), kiu estis 2 kilometrojn for de la tranokteja bieno...



Kajakado !

La vendredo estis suna tago... feliĉe ĉar ankaŭ estis la tago de kajakado. Poste ni denove marŝis ĝis Rosée (ĉar niaj brakoj laciĝis pro kajakado, ni ankaŭ devis laciĝi la gambojn)

Fino de la semajno... tago de la gepatroj

Ni festis la finon de la tendumado, kaj samtempe de la ferioj, kun gepatroj kaj amikoj. Eĉ la patro de Valer, nia skoltestro, alvenis !



Dum tiu semajno, ni ankaŭ laboris, babilis, tabulludis, kreis tablon, benkojn, fajrotablon kaj vestaĵsekigilon. Estis ankaŭ totema ceremonio, ni ĉiuj nun havas Esperantan totemon.

Ĉiuj inter 12 kaj 18 jaroj (pli malpli) estas bonvenaj aliĝi al la grupo.

Vizitu nian retejon : <http://verdajskoltoj.wordpress.com/>

kaj kontaktu Valer : doumontvalere@yahoo.fr

Samy